

I

La Henry-Pafilo

Kiam mi, devigite de la cirkonstancoj, apartiĝis de Winnetou, kiu devis persekuti la murdinton Santer:on, mi ne jam antaŭsciis, ke daŭrus monatojn, ĝis mi revidis mian ruĝan amikon kaj sangofraton. Fakte la posta aro de okazaĵoj estis tute alie, kiel mi pensis tiutempe.

Ni, Sam Hawkens, Dick Stone, Will Parker kaj mi, atingis post vere pena rajdegado la enfluejon de la suda branĉo en la Red River:on, kiun Winnetou estis nominta Rio Boxo de Natchitoches. Tie ni ekspektis trovi apaĉan anon de Winnetou. Bedaŭrinde tiu espero ne plenumiĝis. Kontraŭe, anstataŭ la sopiritan mesaĝiston, ni trovis je la interkonsentita loko la mortaj korpoj de la du *trader*:oj, kiuj estis donintaj al ni la informojn pri la vilaĝo de la Kajovajoj. Ili estis mortpafitaj, fakte de Santer, kion mi eksciis pli poste.

Ĉar Winnetou ne estis lasinta ian sciigaĵon tie, ni ne sciis, kie li troviĝis, tial ni ne povis sekvi lin, kaj turniĝis al la Arkansas, pro atingi St. Louis:on sur plej rekta vojo. Mi ege bedaŭris, ke mi ne povis revidi la amikon jam tiam, sed ne estis ebla al mi ŝanĝi tion. —

Post longa rajdado ni alvenis en St. Louis unu vesperon. Mia unua irado estis al mia maljuna *Mr. Henry*. Kiam mi eniris en lian laborejon, li sidis en la lumo de lampo ĉe la labortablo, kaj ne aŭdis la sonon, kiun mi kaŭzis per la malfermado de la pordo.

„*Good evening, Mr. Henry!*“, mi salutis, kvazaŭ mi estis estinta ĉe li la lastan fojon nur hieraŭ. „Ĉu Vi baldaŭ estos finiginta Vian novan pafilon?“

Dum tio mi sidiĝis sur la eĝon de la tablo, ĵus tiel, kiel mi ofte antaŭe estis farinta tion. Li ekrektiĝis sur sia seĝo, fiksrigardis min kelkan tempon kiel mense neĉeestante, kaj tiam ekkriis per ĝojo.

„Estas — Vi — ĉu — ? Ĉu Vi estas tie ĉi? La instruisto — la — la *surveyor* — la — la diableca Old Shatterhand!“

Tiam la maljunulo forte metis siajn brakojn ĉirkaŭ min kaj premis min, ke mi preskaŭ ne plu povis spiri.

„Old Shatterhand, ĉu? De kie Vi konas tiun nomon?“ mi scivolis, ĵus kiam li estis iom malpli ekscitiĝinta.

„De kie? Vi eĉ demandas, ĉu? Ĉie oni parolas pri Vi. Vi bubo! Vi estiĝis okcidentulo, kiel oni priskribas iun en leksikono! *Mr. White*, la inĝeniero de la najbara sekcio, estis la unua, kiu alportis novaĵojn pri Vi; vere laŭdadis Vin, tion mi diru. Sed la veran kronon metis Winnetou sur Vian kapon.“

„Kial?“

„Li rakontis ĉion al mi – ĉion!“

„Ĉu rakontis? Do ĉu Winnetou estis tie ĉi?“

„Memkompreneble li estis tie ĉi.“

„Nu, kiam?“

„Tri tagojn antaŭe. Vi estis rakontinta al li pri mi, pri mi kaj la maljuna ursmortigilo, kaj tial li ne povus pasi St. Louis:on, sen viziti min. Li raportis al mi, kion Vi spertis kaj sukcesis. Virbubalo, grizlo kaj tiel plu! Vi eĉ akiris la dignon de ĉefo!“

En tiu maniero li parolis kelkan tempon plu, kaj tute vanis, ke mi interrompis la paroladon de Henry plurajn fojojn. Li ĉirbaŭbrakis min ree kaj ree, kaj ĝojis ege, ke estis li, kiu estis gvidinta mian vivovoĵon en la Sovaĝan Okcidenton. Finfine eblis igi lin, rakonti al mi, kion Winnetou raportis al li pri la persekutado de Santer.

La kanuado de la persekutito estis tiel rapide, ke li atingis la finaĵon de la suda riverobranĉo je la sama tempo kiel la komercistoj, kvankam ili estis foririntaj de la vilaĝo de Tangua multe pli frue. Li estis devigita rezigni pri la *nugget*:oj de Winnetou, kaj tial li intencis haviĝi la bezonitajn monvaloraĵojn alimaniere. Tiel la komercistoj kaj iliaj varoj venis ĵus konvene al li. Santer mortpafis la du nenion antaŭsciintajn virojn, verŝajne el embusko. Post tio li foriĝis kun iliaj muloj. Winnetou ekkonis ĉi ĉion de la spuroj, kiujn li trovis je tiu loko.

La murdisto ne intencis facilaĵon, ĉar la kondukado de tiom multaj ŝarĝobestoj trans la savano signifas multajn komplikajojn por unu sola homo. Krome li devis hasti, ĉar li sciis, ke la persekutintoj estis malantaŭ li.

Bedaŭrende, de la vidpunkto de la apaĉoj, komencis plurtaga pluvo, kiu forlavis ĉiun spuron, tiel ke Winnetou povis ne plu fidi pri siaj okuloj, sed nur pri supozoj kaj pritaksoj. Verŝajne Santer volis iri al unu el la plej proksimaj loĝatejoj, pro monigi sian rabaĵon, kaj tial ne restis io plu al la apaĉo, sed rajdi al tiuj loĝatejoj laŭ la vico.

Nur post aro de perditaj tagoj, li retrovis la malaperintan spuron sur la faktorio de Gater. Santer estis estinta tie, vendinta ĉion, kaj aĉetinta bonan ĉevalon, pro rajdi sur la tiutempa Red River:a vojo orienten. Do Winnetou adiaŭigis siajn apaĉojn, kiuj estis nur malutilaj al li, sendis ilin al la hejmejo, kaj daŭrigis la persekutadon sole. Li kunhavis sufiĉe da *nugget*:oj pro povi vivi en la oriento longan tempon.

De tiu bieno, la apaĉo ne plu estis perdinta la spuron de Santer, kaj sekvis ĝin per hastaj rajdadoj ĝis St. Louis, de kie ĝi kondukis al New Orleans. Lia hasto estis la kaŭzo, ke li estis veninta pli frue al St. Louis ol mi. Li lasis la mesaĝon ĉe Henry, ke mi ankaŭ venu al New Orleans, se mi sentus emon pri tio, sed ankaŭ, ke li tion ne supozis konsilinda, pro la ĉiam pli altiĝinta nesekureco en la sudo. Fakte en Ameriko la civita milito minacis ekkomenci. Tial Winnetou aldonis la komenton al sia mesaĝo, ke li ĉiukaze estus sendonta informon al *Mr. Henry* poste, kie li estis trovebla.

Kion mi devis fari? Ĉu atendadi en St. Louis? Ne. Oni ne povis scii, kiam la informo de Winnetou estus alvenanta. Ĉu sekvi lin al New Orleans? Pri tio li mem avertis min. Krome mi, kiel germano, kiu neeble povis konsenti pri la opinio de la ribelaj sudaj ŝtatoj pri la sklava konflikto, kaj tial estus senkondiĉe estinta suspektige, ne sentis emon meti min en cirkonstancojn, kies finiĝo ne estis antaŭvidebla. Ĉu viziti mian familion, kiu bezonis mian helpon? Tio verŝajne estus estinta la plej facila eblaĵo. Sed —

Mi estis trinkinta la spiron de la savano, sed ne sufiĉe longe, pro esti tedita de ĝiaj allogoj. Krome mi estis juna, kaj instigita, per mema agado prui la kapablojn, kiujn mi estis akiradinta en la Sovaĝa Okcidento. Eĉ mi posedis bonegan pafilon, kaj ĉevalon, kiu ne estis komparebla kun iu alia en la tuta regiono.

Apenaŭ, ke mi havis tiun penson, mi estis decidiĝinta. Kaj Henry vere estus estinta la lasta, kiu estus provinta ŝanĝi mian opinion. Male, li tuj transprenis la ideon kaj pensis eĉ plu, ĉar ĝi ja tute estis laŭ la senco, pri kio Henry dekomence deklaris, ke ĝi estus mia destino.

Sed unue memkompreneble endis fari miajn negociajn taskojn. Jam je la sekvinta mateno mi sidis kun Sam Hawkens, Stone kaj Parker malantaŭ tiu vitra pordo, kie oni tiutempe estis ekzameninta min sen mia scio. Mia olda Henry ne lasis preterpasi la ŝancon akompani min. Tie multaj aĵoj indis esti rakontataj, raportataj, klarigataj, kaj ni eksciis, ke nia sekcio faris la plej strangajn kaj plej danĝerajn spertojn. El ĉiuj *surveyor*-oj, mi estis la sola, kiu travivis.

Kiam endis trakti la demandon pri la pago, Sam ege klopodis eltiri kroman salajron por mi, sed vane. Ni tuj rivecis nian monon, sed ne unu dolaron plu, kvankam mi transdonis ĉiujn desegnaĵojn kaj ankaŭ la mezurilojn, kaj mi sincere konfesas, ke mi eldonis la mapojn kaj skizojn, kiuj estis faritaj kaj savigitaj per tiom da peno, ne sen sento de ĉagrena elreviĝo. La sinjoroj estis dungintaj kvin *surveyor*-ojn, sed pagis nur unu, kaj irigis la salajron de la aliaj kvar en iliajn proprajn poŝojn. Tiel malmultekoste ili ricevis la plenan rezulton de nia tuta laboro en iliajn manojn — aŭ plie la rezulton de mia trostreĉiĝado.

Tial Sam ellasis akran paroladon, sed sukcesis per tio nenion plu, ol ke ili ridis pri li, kaj ŝovis lin kune kun Dick:on kaj Will:on al la pordo kun diplomataĉaj frazaĵoj. Mi iris kun ili, nun pli riĉe je unu sperto, kaj silentis. Cetere la sumo, kiun mi estis ricevinta, dece altis, je miaj rilatoj.

Mi do volis reiri en la okcidenton. Per ĝentileco, aŭ eble ankaŭ per fidelemo, mi demandis la ‚trifolion‘, ĉu ili volis kuniri. Dum Stone kaj Parker trankvile akceptis mian proponon, ĝi kaŭzis la plej grandan miron je Sam. Li disŝiris la okulojn vaste, kaj tiam ekis:

„Ĉu ĝi klakas en Via kapo, aŭ ĉu Vi volas mistifiki min? Vi ja certe ne povas seriozi pri tio, ĉu?“

„Kial ne?“

„Ĉar nenio serĉindas al Vi en la okzidento, se mi n'erasas.“

„Sed mi kredas, ke jes!“

„Nu diru al mi, pro la graco de kukolo, kion Vi perdis tie!“

„Ajn kiu estas vera okzidentulo, ne demandas pri tio. Li iras en la okzidenton, simple ĉar li devas.“

„*Egad!* Nu aŭskultu tiun kokidon, kiel ĝi ŝveliĝas kaj malfermegas la bekon! Kion vi diras pri tio, Dick kaj Will?“

„Ke la kokido estiĝis sufiĉe eminenta koko“, Will ridetis.

„Malprave, tute malprave! Vi devis diri, ke tiu *greenborn* havas sufiĉe eminentan kokinon! Tie supre!“ Dum tio li montris per la fingro sub la randon de sia pratempa ombrodonilo.

„Sed tiun birdon Vi ja metis en mian kapon mem!“ mi komentis neĉagrenite.

„Tio estis tiutempe! Sed ekde tiam mi havigis la opinion, ke Vi neniam, en Via tuta vivo ne estiĝos — — —“

„Nu ĉesu!“ mi interrompis lin. „Mi ja konfesas, ke mi ankoraŭ devas lerni multon, sed tiel sensperta mi ne plu estas, ke mi farus tiajn infanaĵajn transkapiĝojn kiel Vi antaŭ mallonga tempo ĉe la kajovajoj.“

Tio atutis. Intertempe la buŝo de Sam estis ŝtopita.

„Cetere“, mi pluis, „mi vere devas iri en la okzidenton. Mi bezonas materion por miaj libroj, kiujn mi skribos. Mi ja jam rakontis al Vi pri tio!“

„Jes, Vi rakontis! Sed mi diras tion al Vi, ke Vi ne sukcesos skribi tiujn librojn, ĉar Vi ne revenos vivante el la okzidento.“

„Ho ho!“

„Jes, ho ho!“ li imitaĉis min. „Kaj morta viro ne povas skribi librojn, se mi n'erasas, hihihih!“

Per tio li lasis min tiun fojon. En la sekvintaj tagoj okaziĝis unu aŭ pli da tiaj pli malpli ŝercemaj paroloj de ambaŭ flankoj, sed finfine Sam konfesis, ke mi pravus. La tri amikoj eĉ deklaris sin esti pretaj akompani min, se mi nur volus pacienciĝi ĝis la komenco de la pli varma sezono, ĉar unue ili planis dece refreŝiĝi. Sed tiel longe mi ne volis atendi, kaj tiel mi plej kore adiaŭiĝis de la ĉiam pli ŝatitaj kunuloj. Mi estis revidonta ilin nur post jaroj, en tute alia regiono.

La nun sekvintajn monatojn mi povas priskribi koncize. Unu duonon de la sumo, kiu estis mia salajro, mi sendis hejmen, kaj pli grandan parton de la alia mi deponis en banko, kiel rezervo. Kun la restaĵo mi ekvojaĝis, gaje kaj ageme.

Mi utiligis la vintrajn monatojn pro lingvaj studioj ĉe diversaj indianaj triboj, kiuj estis amikecaj al la apaĉoj. Alie mi gardiĝe evitis la ruĝulojn. Mi gastigis pli longan tempon nur ĉe unu Komanĉa tribo, kies ĉefo, Tevua-ŝohe, eĉ fumis la kalumeton de la paco kaj amikeco kun mi. En la printempo mi iris trans la roka montaro, kaj vizitis la Mormonan urbon apud la Granda Salolako. Kelkaj sinistraj kaj enigmaj aludoj el la

buŝo de unu sola *trader*, kiun mi renkontis, tiam logis min rajdi pli norden, en la regiono de la rivero Yellowstone, kiu hodiaŭ estas ŝate vizitata kaj fame per la nomo Nacio-parko, sed tiutempe ĝi ankoraŭ estis tute nekonata. Tie supre, ĉirkaŭata de la plej belegaj mirakloj de la naturo, mi devis travivi danĝerajn okazojn kun la Suo-Ogelaloj. Post tio mi transgrimpis la rokan montaron denove, dum kio mi estis ŝuldinta mian vivon pli ol nur unu fojon al la rapideco de mia ĉevalo Hatatitla, kaj tiam mi turniĝis suden. Mia celo estis la Rio Pecos.

Survoje aligis al mi la anglo Emery Bothwell, bonedukita, agema kaj kuraĝa viro, kiun mi renkontis refoje pli poste en la Saharo, kion multaj el miaj legantoj certe scias.

En la apaĉa pueblo ni estis bonvenigataj per ĝojkrio. Je mia plej granda ĝojo tieis Winnetou, kiu estis reveninta jam monatojn antaŭe de sia, bedaŭrinde senrezulta, persekutado de Santer. Li ĉasis la murdiston ĝis New Orleans kaj reen al Vicksburg, sed tiam perdis la spuron en la konfuzajoj de la civita milito. Santer estis fuĝinta sukcese.

Ni pasigis kvar semajnojn inter la apaĉoj, sed tiam la pensado pri la hejmo grandiĝis en mi per forto. Ankaŭ Bothwell sopiris hejmen. Winnetou memkompreneble ne faris provojn reteni nin, sed akompanis Bothwell-on kaj min, kunkondukante dudek apaĉojn ĝis la Nugget-tsil. Tie ni pasigis tutan tagon, kiu estis dediĉata al la memoro pri la karaj mortuloj. La sekvintan matenon mi adiaŭiĝis de Winnetou, ekspektinde por pli longa tempo, kaj donis mian Hatatitla:n al li pro flegado. Anstataŭe mi ricevis mian oldan rozfelulon inter la krurojn, kiu estis nur kunkondukita, sed nun estis tute freneze per ĝojo, kiam mi sidiĝis sur ĝin la unuan fojon post longa tempo.

Ĉio, kion mi spertis unue sole, kaj tiam kun Bothwell, estis rakontita nur tre koncize, kaj je mia reveno al St. Louis, mi estis surprizata trovi la nomon Old Shatterhand en ĉiun buŝon. Kiam mia olda Henry ekkonis mian miriĝon pri tio, li diris en sia strange-humura maniero:

„Kia ulo Vi estas! Dum kelkaj monatoj Vi spertas pli ol aliaj dum pluraj jaroj, feliĉe iras tra ĉiuj danĝeroj, kiel pistola kuglo tra sorbopapero, konkuras kiel *greenhorn* kun plej spertaj okcidentuloj, forĵetas ĉiujn barbarajn leĝojn de la Sovaga Okcidento, per ĉiam respekti la homon en Vian kontraŭulon, kaj tiam malfermigis la buŝon per surpriziĝo, ke oni parolas pri Vi. Mi diras al Vi, Vi eĉ superatutis la grandan Old Firehand-on per Via fameco jam post mallonga tempo. M’havis mian brilan ĝojon, kiam mi iam kaj tiam aŭdis pri Vi, ĉar ja estis mi, kiu montris tiun vojon al Vi. Pro tio ĝojo mi danku al Vi. Vidu, kion mi havas jen!“

Li iris al sia pafilujo, elprenis — — la unuan pretan Henry-pafilon, klarigis al mi la konstruon kaj uzadon de la armilo, kaj tiam kondukis min al lia pafejo, kie mi provu kaj prijuĝu la nesupereblan pafilon. Mi estis simple ravigita de la pafilo, sed atentigis la maljunulon, ke la disvastigo de tiu rapidlanĉa armilo estus kaŭzanta la plej malavantaĝajn konsekvencojn al kaj la besta kaj homa aro de la okcidento.

„M’scias, scias“, Henry kapjesis. „Vi ja klarigis ĝin al mi antaŭe. M’do faros nur malmultajn ekzemplerojn. La unuan, ĉi tiun, mi donacos al Vi. Vi famigis mian malnovan ursmortigilon, do Vi havu ĝin por ĉiam, kaj ankaŭ la rapidlanĉilon. M’pensas, ke ĝi faros bonajn servojn al Vi dum Viaj estontaj vojaĝoj trans la Misisipo.“

„Sendube! Sed tiukaze mi ne rajtas akcepti ĝin nun.“

„Kial ne?“

„Ĉar mi nun ne iros en la okcidenton.“

„Do kien?“

„Unue hejmen, kaj poste al Afriko.“

„Af-af— — af — — —!“ li elvokis, forgesante refermi la buŝon. „Ĉu Vi ne saĝas? Ĉu Vi volas esti negro aŭ hotentoto?“

„Malpli“, mi ridis. „Sed mi promesis al Mr. Bothwell renkonti lin en Alĝero. Tie loĝas parencoj de li. De tie ni volas fari ekskurson en la Saharon.“

„Kaj esti manĝata de leonoj kaj hipopotamoj!“

„*Pshaw!* La hipopotamoj ne manĝas karnon, kaj ne loĝas en la dezerto.“

„Sed la leonoj!“

„Ankaŭ tiuj ne ekzistas en la vera Saharo. Rabobestoj bezonas akvon.“

„Mi ja scias, ke ili ne trinkas siropon! Temas pri multo krome. Ĉu ne, en Alĝero oni parolas la francan?“

„Jes.“

„Ĉu Vi komprenas tion?“

„Jes.“

„Kaj en la dezerto, ĉu?“

„La araban.“

„Sed da tio ĝi certe mankas al Vi.“

„Ne, la profesoro, kiu estis mia instruinto de la araba, estas supozata la plej bona arabologiisto en Germanujo.“

„Ho! La kukolo Vin prenu! Ja estas neniuj flankoj, de kiu Vi estas atakebla! Sed ideas al mi alia kaŭzo, kiu igos Vin rezigni pri tiu vojaĝo. La mono.“

„Mi havas iom.“

„Ho! Ho!“

„Jes! En la banko ankoraŭ estas sufiĉa restaĵo de mia salajro kiel *surveyor*.“

„Sed ĉu tio sufiĉos?“

„Jes, se oni ne havos tro multajn pretendojn. Kaj mi estas sufiĉe nepretendema, kiel Vi scias.“

„Do nur kuru, kuru, ĉiam kuru en Vian Saharon!“ li elvokis ĉagrenite. „M’ne povas kompreni iun, kiu volas iri tien! Sablo, nenio krom sablo kaj milionoj da dezertaj puloj! Vi povus farti tie ĉi multe pli bone. Ni estas homoj disiĝintaj, ĉar kiu scias, ĉu ni iam revidiĝos.“

Li iris jen kaj reen per longaj, rapidaj paŝoj, grumblis ĉiaspecajn ĉagreniĝajn aĵojn, kaj ŝvingis siajn brakojn en ĉiujn direktojn dum tio. Sed lia bonanimeco tre baldaŭ revenkis. Li ekstaris antaŭ mi, kaj demandis:

„Ĉu Vi povas uzi la ursmortigilon ankaŭ en la dezerto?“

„Jes.“

„Kaj la rapidlanĉilon?“

„Eĉ plie.“

„Jen Vi havas ilin ambaŭ, kaj nun ekforiĝu! Eliĝu, kaj neniam lasu Vin vidi ĉe mi poste, se Vi ne volas esti elĵetota, Vi — Vi — — stulta dezertazeno, Vi!“

Henry premis la du pafilojn en miajn manojn, malfermŝiris la pordon, elŝovis min, kaj riglis la pordon malantaŭ mi. Tio nu estis lia maniero. Mi lasis lin agi laŭ lia volo. Sed kiam mi iris elen sur la straton, li jam etendis la kapon el la fenestro, kaj demandis amikece:

„Vi ja venos al mi ĉi vesperon, ĉu ne?“

„Memkompreneble.“

„Well! M'kuiros bierosupon per la kafmaŝino, Via ĉefmangĝaĵo ĉi vespere. — Kaj nun foriru!“

Tiutempe mi ne jam antaŭsciis, kiaj grandaj utilaĵoj tiuj du pafiloj estis estontaj dum mia pli posta migrada vivo. Mi ne nur ŝuldas al ili la plej grandan parton de mia famo kiel okcidentulo, sed ankaŭ oftajn fojojn mian vivon. Kaj ajn kie estis rakontita ĉe la restejoj fajroj inter la Misisipo kaj la roka montaro pri la agoj de Winnetou kaj Old Shatterhand, tie oni menciis, krom la arĝentpafilo de Winnetou, ankaŭ la ursmortigilon, kaj la Henry-pafilon de lia blanka frato.